

Esperanto-socio

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 660, 1976.06.02 & 04 & 05

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum serio da prelegoj ni dediĉos nian atenton al la observado de nia esperanto-socio kaj de ties karakterizaĵoj. Tiun ĉi prelegaron ni iom post iom publikigos en nia organo **Monata Cirkulero de Kultura Centro Esperantista**. Ni malfermos debaton, kie ni registros kontraŭajn argumentadojn. Kiuj ŝatus ricevi tiujn ĉi artikolojn, tiuj tiucele skribu al ni tra la kanalo de la kurtonda servo de Radio-Svislando.

A.- Iu ajn uzanto de la planlingvo esperanto, eĉ se li estas nura balbutanto, konsistigas eron el almenaŭ sufiĉe vasta komunumo, kiun ĝuste karakterizas la uzado de esperanto. Vole nevole tiu ĉi esperanto-uzanto estas iel ligita al la esperanto-socio, eĉ se li rifuzas aŭ neglektas la kontaktojn kun la aliaj esperanto-uzantoj kaj kun ties organizaĵoj.

Cl.- Per la vorto **ESPERANTO-SOCIO** ni kovras la koncepton « Tuto da Esperanto-uzantoj » aŭ pli simple « Esperanto-uzantaro ». Tiu ĉi uzo de la vorto **SOCIO** kongruas kun la unua signifo-nuanco, kiun donas pri ĝi **Plena Ilustrita Vortaro** de Esperanto, kiun ni nomos PIV.

A.- PIV jene difinas la vorton **SOCIO** : « Tuto da homoj, kunvivantaj pro komunaj interesoj kaj havantaj komunajn kutimojn kaj komunajn leĝojn : floranta socio, ktp. » Kvankam la Esperanto-socio ne estas tre floranta, ni povas difini ĝin kiel la *tuto da Esperanto-uzantoj* aŭ kiel la *Esperanto-uzantaro*.

Cl.- Ni konsideras, ke la vortoj **Movado** kaj **esperantistaro** kovras realecojn malpli vastajn, ol kiun entenas la vorto **Esperanto-socio**. La nocioj **Movado** kaj **esperantistaro** estas entenataj en la koncepto **Esperanto-socio**.

A.- La vortoj **Esperanto-uzanto** kaj **esperantisto** ne sinonimas. Esperantisto sin ĝenerale konsideras **Esperanto-uzanto**, sed ni konas esperanto-uzantojn, kiuj ne konsideras sin **esperantistoj**.

Cl.- Ŝajnas al ni, ke pluraj difinoj de PIV koncerne la vorton **ESPERANTO** kaj ties derivaĵoj ne kongruas kun la lingva realeco. Ni ekzamenu ilin kritike :

A.- Ni komencu donante la PIV-an difinon de la vorto **ESPERANTO** :

Cl.- « Lingvo internacia kaj neŭtrala, kreita de L. L. Zamenhof kaj publikigita de li en 1887 ».

A.- En tiu ĉi difino mankas minimuma registrado pri almenaŭ du ĉefaj eventoj, kiuj orientis la disvolviĝon de la lingvo. Ili estas la referendumo decido de 1894 kaj la akceptado en 1905 de lingva normo sub la nomo **Fundamento**. La kontraŭuloj de esperanto ĝenerale malpli kritikas la lingvo-projekton de Zamenhof, ol la kontraŭ-reformismajn decidojn de 1894 kaj 1905, kiuj direktis la evoluon de la lingvo. La PIV-a difino de la vorto **ESPERANTO** ne estas sufiĉa.

Cl.- Kurioze PIV registras la malofte uzatan vorton esperantano kun tiu ĉi difino : « Neaktiva aprobanto de Esperanto ». Tiu ĉi limigo de la signifo de la sufikso **ANO** al **neaktiva aprobanto** neniel kongruas kun la lingvopraktiko. La vorto **ESPERANTO** konservis plenan

signifon de ANO DE ESPERANTO. Tiel ĝin uzas ekzemple Esperanto-uzantoj, kiuj ne deziras ricevi la nomon ESPERANTISTO.

A.- Pri tiu ĉi vorto ESPERANTISTO PIV diras : «Persono, kiu scias kaj uzadas Esperanton». Ni bedaŭrinde konas multajn balbutantojn, kiuj konsideras sin kiel esperantistojn kaj kiujn la aliaj esperantistoj ankaŭ konsideras kiel siajn. Tamen tiuj ĉi personoj, kiuj apenaŭ balbutas la zamenhofan lingvon ne povas esti difinitaj per la sciado de esperanto. La signifa enhavo de la vorto ESPERANTISTO estas pli vasta ol la difina enhavo de PIV. La adeptoj de Esperanto preferis la vorton ESPERANTISTO al ESPERANTANO ne nur pro la simileco kun la franca lingvo, sed ankaŭ por reliefigi sian idean sintenon.

Cl.- La difino de la vorto ESPERANTISMO ne estas sufiĉa. Jen ĝi laŭ PIV : « Penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa ». Ni konas personojn, kies penado estas la disvastigo en la tuta mondo de la uzado de alia lingvo neŭtrale homa ol esperanto. Tiel estis siatempe por la VOLAPÜKISMO kaj daŭre estas por la IDISMO kaj la NATURALISMO. En la difino de la vorto ESPERANTISMO devus troviĝi la vorto ESPERANTO, ĉar la ESPERANTISMO ĉiam konsideris Esperanton kiel la solvon mem al la lingvo-kaoso tutmonda.

A.- Tiuj ĉi mankoj koncerne la difinojn de vere fundamentaj vortoj respegulas ĝisnunan nesufiĉan esploradon de la karakterizaĵoj esperantaj. Ili povas eĉ falsigi la realecon kaj konduki al miskomprenoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!